

ESPERANTISTO

ESPERANTYSTA POLSKI

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO KAJ EKSTERLANDE
MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE I ZAGRANICĄ

ELDONANTO
WYDAWCA

POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO.

REDAKTANTOJ
REDAKTORZY

PROF. DR. ODO BUJWID — TAD. HODAKOWSKI

APERAS LA 1-an DE ĈIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI
GIS LA 20-a DE ĈIU MONATO.

Viena Internacia Konferenco.

La Konferenco, organizita en Vieno de 19—24 majo, estis sendube unu el plej grandaj paŝoj antaŭen en tuta nia lasttempa Esperanto-movado. Estis ja unuan fojon aranĝita afero, kiu interesigis ne nur la tutan esperantistaron, sed ankaŭ kelkajn registarojn. Estas granda merito de la Organiza Komitato, kiu povis ekinteresigi la Registraranojn de Aŭstrio kaj aranĝi la entreprenon sub la Alta Protektorato de Sinjoro Konfederacia Kanceliero de Aŭstrio Dro Engelberto Dollfuss, kun speciala subteno de Komerca Ministro S-ro Stockinger kaj Ministro de la Instruado S-ro Kurth v. Schuschnigg, kiuj persone partoprenis en la diskutado kaj oficiale akceptis la reprezentantojn de la Internaciaj rondoj.

Ne kutima estis la malferma kunsido de la Internacia Konferenco en la grandioza viena parlamenta salonego, kiu vidis jam tiom da diversaj granda okazintaĵoj dum la antaŭ nelonge pasinta imperiestra epoko.

Plenplena estis la granda salonego, kvankam tio okazis dum festotagoj de Pentekosto, kiam ordinare ĉiuj urbanoj forflugas el la urbo eksteren por uzi la belan printempan tagon en la freŝa aero en belegaj ĉirkaŭaĵoj de Vieno, tiom famaj en la tuta mondo.

Evidentiĝis, ke la interesiĝo por Esperanto jam kreskis ĝis sufiĉa kompreno de la graveco de la situacio kaj valo-

ro por la tuta homaro de la tiom efika interkomprenigilo.

La diskutoj de la Internacia Konferenco meritas tute apartan detalan priskribon, kiu okazos post nelonga tempo ankaŭ en unu el proksimaj numeroj de P. E.

Nun ni volas rimarkigi nur kelkajn momentojn.

Oni povis konstati, ke la Aŭstria Registaro estas preta subteni Esp. kiel interkomprenigilon por la turismaj rondoj enkondukante la lingvon en la lernejon, kiel objekton de la instruado. Memkompreneble tio ne okazos devige, ĉar la popolo ne ankoraŭ estas tute preta por ĝenerale akcepti la lingvon — kvankam tio estus ebla por Aŭstrio, tiom fama turisma lando, havanta unuarangajn belajojn kaj konstruaĵojn eĉ multajn historiajn vidindaĵojn — tre valoran ligilon kun aliaj landoj de la mondo.

Memkompreneble la afero samon signifas por aliaj nacioj de l' mondo. Ili ĉiuj devus akcepti la lingvon. Sed tio ne sukcesos ĝis oni faros unuan ekzemplon. Kaj nun tio estas farita.

Kolektiĝis ja dum la konferenco reprezentantoj de 25 nacioj, eĉ malproksimaj Usonanoj, Brazilanoj, Meksikanoj kaj ĉiuj dum malferma kunsido kaj dum postaj diskutoj konstatis ne nur valoron sed neceson akcepti la internacian E. lingvon.

Speciale favore sin esprimis edukaj rondoj de la instruista esperantistaro: la reprezentantinoj de la Education Nouvelle, de la International (IALA) Lang. As., la Instituto de Jean Jaques Rousseau en Genevo kaj la Brita Instruistaro kun Dro Fischer kaj f-ino Edwards, multaj reprezentantoj de l' Aŭstria Instruistaro kun s-ro dro F. Wollmann, kiu faris interesan raporton dum malferma kunsido (publikita en la nuna nro de P. E.). Mi ne citos multajn aliajn germanlingvajn rondojn. Ĉiuj dum la lasta kunsido decidis unuanime enkonduki Esp. en la lernejon. En tiu direkto ĉiuj alilandaj reprezentantoj aprobis unuanime fari samon ĉe siaj registaroj.

Blindularo kun ilia reprezentanto faris saman projekton por enkonduki la

lingvon E. por publikigo de libroj en Braila skribo.

Estis interesa la observo, jam delonge konata, ke E. enkondukita en kelkaj lernejoj en Britujo multe helpas la lernadon de aliaj fremdaj lingvoj.

Oni decidis, ke Esperanto estu unue enkondukata kiel nedeviga objekto, kvankam estis kelkaj parolantoj por devigo.

Estas granda merito de s-ro H. Steiner, R. M. Frey kaj dro F. Uebelhör, organizaj komitatanoj, pro la bonege organizita tuta aranĝo kun tre interesaj ekskursoj. Tio restos sendube en la memoro de ĉiuj partoprenantoj kaj utiligos Esperanton kaj ankaŭ la landon de la sukcesplena iniciato, kiu tiom bone komprenis sian taskon.

O. Bujwid.

VIVU LEO BELMONT!

(LA ORA JUBILEO DE LIA LITERATURA AGADO)

Maldensiĝas nia malnova armeo. Ĉiu numero de niaj gazetoj alportas malĝojajn novaĵojn pri la morto de tiu aŭ alia malnova pioniro de nia movado. El la plejado de la unuaj batalantoj por nia idea afero restas ĉiam malpli da pioniroj.

El la „unua milo“, el la „unua rondeto“, inter la nemultaj jam vivantoj restis ĝis nun fidela al la Verda Standardo Leo Belmont.

Rigardo malantaŭen prezentas al ni kvazaŭ kalejdoskope diversajn peripeziojn de la sorto. Kiom da diversaj malhelpaĵoj havis antaŭ si la fidelaj ĝis nun kavaliroj de la „unua milo“! Morto, Milito, Krizo kaj multegaj aliaj ideoj kaj materiaj kataklismoj (kiu trakalkulus ĉiujn?)! Post ĉiu el tiuj diversaj viv-kruelaĵoj forpereis certa nombro da tiuj idealistoj. Ju pli antaŭen al nia tempo des malpli da ili restas. Kaj inter tiuj ja tiom malmultnombraj herooj elbrilas ĉiam la splendoro figuro de la plej persista, plej fort-vola Leo Belmont.

Kiu ne memoras la faman profetaĵon de la studento, kiu, konatiĝinte en 1887 kun la „unua libro“ de Lingvo Internacia (ankoraŭ tiam ne posedinta la nomon: Esperanto), skribis entuziasmoplenan leteron al Dr. Zamenhof kaj finis per la famaj profet-vortoj: Vi venkos, Sinjoro!

Estis Leo Belmont, kiu la unua blovis bel-spiriton en nian lingvon, kreinte la Esperantan Poezion.

Estis li, kiu ekde la unua momento fla-

me propagandis nian lingvon ĉu per la plumo, ĉu per sia ora buŝo. Kaj ne nur en sia propra patrujo. En rusaj kaj germanaj gazetoj ni legas liajn perfektajn artikolojn. En pola lingvo li verkis lernolibron en versoj (kun rimoj!).

Duona jarcento pasis ekde Leo Belmont metis siajn unuajn paŝojn sur la literatura kampo. En Nro 27. de 1884 (sekve pli malpli en julio) de la semajna revuo pola „Świt“ aperis lia unua poemo s. t.: Rozzalona (Plendo de virino).

Duona jarcento! Elparoliĝas facile. Sed kiom da travivaĵoj! Kiom da disreviĝoj! Kiom da luktadoj! Kiom da animbataloj! Precipe por tia menso kiel Belmonta por tia karaktero, kiu ne scipovas trasilenti ian ajn maljustaĵon.

Altruisto, idealisto, fervorulo... senhezita defendanto de justeco, sentima batalanto kontraŭ ĉiu ajn perforto kaj malnobleco, martiro pro siaj konvinkoj (kvinfoje dum la rusa reĝimo arestita kaj senigita de siaj advokataj rajtoj: defendadi en juĝejoj) li ĝis nun, malgraŭ siaj grizaj haroj ne cedis de sia vojo de la vero, malgraŭ ke pli ol ofte li estas sur ĝi tute sola.

Sen timo, kaj — sen makulo! Senlaca verkisto. Vera titano de laboro. Poeto, publicisto, novelisto, romanverkisto, ekonomisto, satiristo, humoristo, tradukisto, jurverkisto, instruitulo en tre multaj fakoj...

Sed super ĉio — fervorega defendanto

de ĉiuj ideoj de progreso kaj libereco. Leo Belmont — nur sub tiu pseŭdonimo li estas konata, kaj maloftulo scias, ke lia vera nomo estas Leopoldo Blumental — naskiĝis en Varsovio la 8. III. 1865, sekve nun finis 69 jarojn. Kia junega animo en tiuj jaroj!

Sian komencan kaj postan, kiel ankaŭ universitatan edukon li ricevis en Varsovio. Ankoraŭ kiel studento li komencis sian literatur - ĵurnalistan agadon. Post la studfino en la Varsovia universitato li transloĝiĝas Petersburgon, tiaman ĉefurbon de la kolosa rusa imperio. Post kelkaj jaroj tamen (1904) li revenas Varsovion kaj establiĝas ĉi tie jam por ĉiam (kiel advokato kaj ĵurnalistoj).

Homo par excellence individua Belmont fondas en 1907 semajnan revuon „Libera vorto“ kaj dum kelkaj jaroj pleniĝas sola ĝiajn kolonojn de la unua ĝis lasta paĝo. Multfojaj konfiskadoj, ĉikanoj kaj arestoj ne malplifortigis lian verkenergion, ĝis kiam la rusa registaro tute fermis lian redakcejon kaj forprenis de li la rajtojn de advokato (nur en la libera

Polujo li ricevis siajn advokat-rajtojn). Sed ankaŭ nun Belmont ne rezignas de sia pionira agado por la progreso. Jam ne en sia propra organo, li sur la kolonoj de la pola kaj rusa gazetaraj ĉiam aperadas, kiam naskiĝas ia tre grava socia aŭ justeca demando. Famaj estas liaj publikaj leteroj (eldonataj en du lingvoj: pola kaj — ĉar ili estis destinitaj por la rusa registaro — ankaŭ en la rusa lingvo), liaj plenŝtopitaj prelegsalonoj, liaj broŝuroj libroj ktp.

Pli ol cent grandvolumaj verkoj eliris el sub la plumo de tiu fervorega verkisto. Homo, kiu sentas la verkad-neceson same kiel la spir-bezonon. El lia plumo ŝprucas, el lia buŝo saltas plej geniaj vortoj.

Dum ĉiuj esperantaj solenoj en Polu-

jo estas Belmont, kiu per sia oratora talento pleje ornamas niajn programojn. Malgraŭ ke dum tiom da jaroj li ĉiam al ni donacadas plej brilajn paroladojn, ĉiujfoja aŭskultado de lia prelego estas por ni — kaj ankaŭ por la neesperantistaj gastoj — vera majstra koncerto de la oratora arto. La fiero de la pola esperantistaro antaŭ la neesperanta publiko. Nia nedisreviga apog-kolono!

Ekde la apero de Esperanto ĝis nun, dum tiom da plej diversaj peripetioj, kiujn nia lingvo travivis en nia lando, ĉiam, dum ĉiuj situacioj, kvazaŭ ora fadeno, tiras sin la sun-brila staturo de Leo Belmont... Kaj vere ne diveneble

estas, kie troviĝas la fonto, el kiu Belmont ĉerpas tiom da energio kaj fido. Li ja travivis tiom multe da maljustaĵoj, tiom multe da krim-batoj, tiom multe da senhontaj atakoj... Kaj malgraŭ ĉio ĉi tiu homo ne kurbiĝas, ne formetas la armilojn... Vera modelo de genia persisteco! Eĉ nia Majstro ĉerpadis ĉe li persistemon.

Kiom Belmont verkis da propagand-artikoloj pri Esperanto estas ne-

eble diri. Polujo travivis en la lastaj 25 jaroj tiom multe da ŝanĝoj, ke... ne eble estas nun trovi ĉiujn redakciojn (ne nur la apartajn numerojn), kie li publikigadis siajn verkojn. Tamen la nombro estas pli ol grandega.

Belmont estis ankaŭ la unua, kiu konatigis la mondon kun... tradukaĵoj el Esperanto. Konataj estis liaj tradukoj en la unuaj jaroj: el Grabowski. Ĉiujn poeziaĵojn de nia Majstro (inkluzive: La Espero'n, kies pola traduko per beleco ne cedas al la originalo) tradukis Belmont pollingven. Kaj tio mem estis propagando ne malpli bona, ne malpli efika ol miloj da argumentoj.

Ne estas imagebla la priskribado de ĉiuj meritoj de Leo Belmont en la kadroj de unu artikolo. Bedaŭrinde la limigiteco devigas nin prisilenti tiom multege



La plej freŝdata fotografiaĵo de l' Jubileulo - farita de la aŭtoro de l' artikolo.

da meritoj de tiu senlaca vort-titano.

Lastatempe Belmont okupiĝas preskaŭ plene pri romanverkado kaj fariĝis sur tiu kampo (kiel ankaŭ sur la kampo de film-verkistoj) eminenta famulo.

Kun Esperanto li restas en plej bonaj kaj oftaj interrilatoj. Ekde kelkaj jaroj li inde karesas postenon en la Esperantista Akademio. De tempo al tempo li verkadas siajn plej amatajn poeziaĵojn kaj — kiam aperas nur bezono — donacas al ni plej brilan, non plus ultra, oratoran majstrajn.

Okaze de tia solena datreveno, permesu, nepritaksebla Geniulo, ke ni esprimu al vi nian entuziasmoplenajn bondezirojn: VIVU LONGE KAJ FELIĈE! La esperanta mondo vin bezonegas.

Mankas al mi via talento por scipovi inde prezenti, kion ni sentas por vi kaj kion ni volus al vi esprimi. Nur la Belmonta plumo kaj la Belmonta buŝo scipovus tion dece prezenti.

Se sur via domo ankoraŭ mankas marmora tabulo kun glolvortoj pri vi, do kredu, ke en niaj koroj jam longe vi posedas tabulojn el plej pura oro kun grandaj el pleja malproksimo videblaj ĉizitaj vortoj:

Leo Belmont - senlaca batalanto por la libereco, vero kaj progreso.

Antaŭ ol mi finos tiun mikroskope koncizigitan meritron de Leo Belmont, mi volas ankoraŭ iomete trouzi la paciencon de la leganto por prezenti al la mondo du versaĵetojn ĝis nun ne publikigitajn, malgraŭ ke ili apartenas al la antaŭmilita epoko.

Siatempe fondis en Varsovio Dr. Leono Zamenhof rondon de „Vere Esperantaj Homoj“. Ĉar ĉirkaŭ la sama epoko ekzistis en Rusujo ligo de „Vere Rusaj Homoj“, ligo, kiu estis fama pro sia konservativemo, malprogresemo kaj kruelemo, la simileco de la nomoj de ambaŭ societoj donis al Belmont impulson por verki la jenan versaĵon:

DEMANDO.

Al fondinto de la rondo de „Vere esperantaj homoj“.

Leono Zamenhof.

Ĉu ĝi estas la fantomoj,
Mian koron traborantaj?
„Esperantaj“ vere homoj,
Homoj vere esperantaj!”

Mi jam konas vorton „vere“.
Homojn vere rusajn konas,

Kaj mi timas, ke danĝere

„Vere esperantaj“ sonas.

Kion fari vi deziras

Diru, ho Samideanoj?

Ĉu infanojn vi disŝiros,

Ĉu ni estos fuliganoj?

Ĉu plu ne per pacaj iloj

Agos ni? — ne per la kanto?

Ni batalos per hakiloj

Por la kara Esperanto?

Kontraŭ lingvo artifika

Se nun iu diros ion,

Per la glav' negramatika

Rompos vi al li kranion?

Se obstina kap' ne volos

Scii pri la „iĝi“, „igi“,

Ĉu kun ĝi ni ne parolos?

Ĉu ni volos ĝin bruligi?

Ĉu ni estos ŝovinistoj,

Por ni „novan senton“ kreu.

Al la neesperantistoj

Ĉu ni krios: „ho, pereu!“

Vi minacas al la mondo

Per la nova katastrofo.

Ho, respondu, Ĉef' de l' rondo.

Vi, Leono Zamenhofo!

L. Belmont.

Je tiu ĉi ŝercaĵo, aludanta la tiutempajn pogromojn kaj huliganajn ekscesojn respondis Dr. Leono Zamenhof samtone per la jena versaĵo:

LA RESPONDO.

Al Ŝ-ro L. Belmonto

pri la celoj de la rondo

„Vere esperantaj homoj“.

Vi demandas pri la rondo

„Vere esperantaj homoj“

Jen ĝi estas la respondo

Pri danĝeraj tiuj nomoj.

Vin turmentas, ho Sinjoro,

La demando pri la celo,

Kaj vi sentas jam per koro

Novajn tondrojn el ĉielo.

Kvietigu vian senton;

Ne intencas nia rondo

Superverŝi orienton

Per la nova sanga ondo...

Kaj ne timu pri infanoj,

Belaj Esperantistinoj;

Ni ne estos „fuliganoj“:

Mankos al ni Stolipinoj. *)

Se eĉ nin inspiros brando

(Ho! — ne pura alkoholo),

Ni ne estos tamen bando

El „estrara monopolo“.

*) Stolipin — tiuepoka ministro en Rusujo.

Ĉiam pace kun ĝentilo
 Agos nepre rondo nia
 Nek per „vere“ rusa ilo,
 Nek... tranĉilo varsovia.

Nia celo — tre modesta:
 Nur paroli esperante,
 Aŭ ĉe tablo iom festa,
 Aŭ eĉ tute ne manĝante.

Sen enua artifiko
 Fluos nia babilado:
 Unu pri la politiko,
 La alia pri trinkado.

Ni per novaj kataklismoj
 Ne minacas al estonto...
 Kontraŭ tre danĝeraj „ismoj“
 Ĉiam gardos nin Belmonto.

Unu el la fondintoj de la Rondo
 „Vere Esperantaj homoj“.

Ĉiam gardos min Belmonto!...

Jes! Nerefuteblaj vortoj! Leganto, ne konsideru min ekzaltulo, aŭ troigulo. Leo Belmont neniam disrevigos nin. Je li ni povas fidi!

Unu el plej fortikaj kolonoj de Esperanto en Polujo.

Unu el plej distingindaj Esperantistoj en la mondo.

Permesu, kara Geniulo de la vorto, ke mi je via ora soleno metu ĉi kelkajn modestajn liniojn al viaj piedoj.

Varsovio, majo 1934.

Edvardo Wiesenfeld L. K.

PRI LA EDUKVALORO DE ESPERANTO KAJ ĜIA ENKONDUKO EN LERNEJOJN.

La studado de ĉiu fremda lingvo enhavas specialan edukvaloron, kiun la aliaj instrufakoj ne posedas samgrade. Pro tio la instruado de fremdlingvoj eminentiĝis de post jarmilo en la instruplanoj de ĉiuj lernejoj, kiuj volas per pli altan klerigon kaj eduki la ĝelernantaron al scienca pensado.

Komparante Esperanton kun naciaj lingvoj ni facile eltrovos, ke Esperanto-instruado ne nur estas samavantaĝa rilate al la formado de la inteligenteco de lernanto, sed ankaŭ superas en kelkaj punktoj la edukvaloron de natura lingvoj.

Unue Esperanto malŝarĝas la meĥanikan memorlernadon pro sia simpla kaj regula strukturo, sia laŭsona skribo, la internacia vortmaterialo kaj la genie elpensita vortfarado. Ĉar en Esperanto la ideoj estas esprimataj en la plej simpla kaj logika maniero, mankas al ĝi la malfacilaj, ofte nelogikaj naciismoj, kiujn lernanto de nacilingvo devas lerni meĥanike. Esperanto do sufiĉe ekzercas la memorkapablon, sed ne troŝarĝas ĝin.

Esperanto-instruado superas la instruadon de iu nacia lingvo rilate al ekzerco de pensado. Kiel artefarita lingvo ĝi havas tute logikan — oni povus diri — preskaŭ matematikan strukturon kaj vortfaradon, kiu devigas la lernanton al klara imago kaj akra pensado. Certe ne estas hazardo, ke Esperanto trovis pli da amikoj inter la naturscienculoj, precipe inter la matematikistoj ol inter la filologoj, kiuj ne vidas en la regula strukturo de Esperanto rimedon por logika ekzercado, sed nur nekutiman rigidan

aperajon kaj sentas la ŝparemon je vortformoj kiel malriĉecon.

La vortfarado de Esperanto vidigas al la lernanto la kaŭzajn rilatojn pri vortsignifo kaj vortformo, pri animo kaj korpo de vorto, dum tiuj rilatoj mallumiĝis en la naciaj lingvoj per la detruo de finaĵoj kaj sufiksoj. — Ĉar en Esperanto la vortkategorioj ĉiam finiĝas je la sama vokalo, la lernanto ekkonas la elementojn de la studado de Esperanto, pli profundigas la gramatikan komprenon de la gepatra lingvo kaj de la lingvo ĝenerale.

Estas vere, Esperanto ne malfermas pordegon al nacia literaturo, tamen jam miloj da verkoj sciencaj kaj poeziaj estas tradukitaj aŭ skribitaj en Esperanto. — Estos tasko de venonta tempo, plenigi tiun trezorejon per pli kaj pli riĉa kaj valora enhavo, por ke la kono de Esperanto malfermu pordegon al mondliteraturo, por ke la esperantistaro povu ĝui la majstrajn verkojn de ĉiu literaturo kaj por ke el tiu universala Esperanto-literaturo naskiĝu kaj kresku la spirito de reciproka estimo kaj frateco, kiu detruos la murojn inter la popoloj, ĉar ni ĉiuj ja estas membroj de unu granda mondfamilio kaj homoj, kreitaj laŭ la portreto de Dio.

Por la disvastigo de nacia lingvo varbas tuta popolo per sia spirita kaj ekonomia potencoj, sed al artefarita helplingvo kiel Esperanto mankas tiu subteno de tuta nacio. Tial devas esti ĝia celo, ke ĝi estu instruata ne nur en kursoj por

plenkreskuloj, sed ankaŭ en kiel eble plej multaj lernejoj de ĉiuj ŝtatoj de la mondo.

Ke la Esperanto-instruado tute ne malsuperas la instruadon de aliaj fremdlingvoj rilate al edukvaloro, mi provis klarigi. Kiom povas valori Esperanto praktike por la internacia komerco kaj turismo, por internaciaj movadoj kaj kunvenoj, tion elmontris kaj akcentis ofte eminentaj viroj kaj virinoj de ĉiuj nacioj.

Tial mi — kaj kun mi la tutmonda esperantistaro — elkore deziras, ke la diskutoj de la Viena konferenco pri la enkonduko de Esperanto en la lernejojn kaj la starigo de ekzamenkomisionoj por Esperanto-instruistoj estu sukcesaj, kaj ke ĝiaj proponoj trovi ĝustan komprenon

kaj favoran akcepton ĉe la diversaj lerneinstancoj de ĉiu lando.

Ĉar, nur se Esperanto — unue kiel nedeviga fako — estos instruata en kiel eble plej multaj devigaj, komercaj kaj perfektigaj lernejoj, nur se ĝi estos enkondukata — se eble kiel unua fremdlingvo — en instruistajn seminariojn kaj mezlernejojn, Esperanto povos akiri gravan akcelon kaj pli da praktika valoro. Nur tiam ĝi povos samtempe plenumi pli efike sian grandan taskon de interligo kaj interfratigo de popoloj laŭ la spirito kaj intenco de sia noblanima elpensinto, laŭ la deziro de ĉiuj bonkoraj, pacemaj homoj.

D-ro Franz Wollmann,
land-lernejinspektoro en Wien.

DR. W. RÓBIN.

Ni mem uzadu Esperanton!

En la lasta numero de „Pola Esperantisto“ mi legis kelkajn saĝajn rimarkojn de S-ro Eŭgen Eli pri nia propagando.

Estu permesite ankaŭ al mi, sufiĉe malnova propagandisto, fari modestan proponon en tiu rilato.

Nia vojo dum la unua periodo de esp. propagando estis dorna, plena je moko, malfido kaj nekredemo.

Feliĉe ni nuntempe atingis gravan ŝanĝon. Oni jam ne mokas, ne malhelpas, ne konsideras nin utopiistoj.

Favore rilatas al ni famuloj, sciencistoj, politikistoj ktp. Ili ne ŝparas al ni gratulojn, deziras sukceson, donas al ni konsilojn, promesas subtenon.

Kaj tamen ni ne sufiĉe rapide iras antaŭen. Oni rediros al mi, ke ni do ĝajnas iom post iom novajn kampojn (ekz. radion), — ke la Viena konferenco eble sukcesos atingi gravajn rezultojn, — ke nia nova esp. organizaĵo antaŭenpuŝos nian movadon ktp.

Bone, sed tamen neniu neos, ke post 40-jara laboro ni ne instruas Esp. en ĉiuj lernejoj, ni ne enkondukis Esp. en la trafikon, intern. konferencojn ktp.

Kial? Ĉu nia afero ne estas matura? Ĉu ni mem ne estas pretaj, aŭ eble nekapablaj?

Kion entrepreni por rapidigi nian venkon? Ĉu atendi pacience ankoraŭ 20 jarojn?

Ĉu ne venis tempo pripensi la kaŭzojn?

Ĉu ni mem estas senkulpaj?

Multaj neesperantistoj demandas nin ofte, kiom da adeptoj ni kalkulas en la mondo?

Estas malfacile ĝuste respondi. Certaj, statistikaj ciferoj mankas. Sed konsiderante la grandiozan nombron de nunaj kaj iamaj kursanoj, — atentigante la milojn de esp. kluboj kaj societoj ktp. — ni kun pura konscienco rajtas respondi: „centmiloj“.

„Bone“ respondas la scivolemaj homoj, — „Se vi estas tiel multnombraj, kial do vi ne venkas? Kiel vi ne prenas pli forte la pordojn, ĝis ili larĝe malfermiĝos? Vi estas videble troaj idealistoj. Vi ĉiam nur esperas kaj ne scipovas defendi kaj realizi vian taskon? Ŝanĝu vian metodon, provu konvinki la mondon, ke vi ekzistas, vivas, uzadas Esp. kaj ke vi decidis venki. Tiam vi venkos“.

Ĉu ne pravaj vortoj?

En niaj esp. Societoj oni tro multe parolas naciajn lingvojn, kaj tro malmulte Esperanton. La lastan oni uzas kutime nur ĉe vizito de fremdaj gastoj. Ĉu prave? Kiel aspektas vendisto de aŭtomobiloj, vojaĝanta mem nur fervoje kaj ne scipovanta uzi aŭtomobilon?

Se ne tutan vesperon, almenaŭ 1/2 horon ni dediĉu al esp. babilado kaj ekzercado.

Eĉ mi kuraĝus proponi, ke en ĉiu Esp.-societo ekzistu „Sekcio de libere parolantaj Esperanton“, alie „P. E. L'oj“ (parolantaj Esp. libere). Ĉiu „PEL“o rice-

vu specialan insignon, laŭ kiu ni lin rekonu. La nunajn insignojn rajtas porti ĉiu aprobanta nian ideon.

Nur „Peloj“ povas nin reprezentadi hejme kaj eksterlande. Nur „Peloj“ estos por ni utitaj ĉe vizito de alilandanoj.

Post tiu unua paŝo sekvu aliaj. Ĉiu „Pelo“, se li eĉ konas fremdan lingvon, uzadu en siaj eksterlandaj rilatoj sole Esperanton.

Ĉe „Cooke“ aŭ aliaj turistaj oficejoj li petu informojn en Esp. kaj ne penadu demandi en fremda lingvo, se li ĝin ne sufiĉe posedas.

En hoteloj ni postulu ĉambron, en re-

LEONO VIENANO.

LINGVA ANGULO.

(Daŭrigo).

15) „koniĝi kun iu“ — laŭ la regulo de sufiĉo estas superflua la formo „konatiĝi“, sed kiam ni insistas pri precizeco ni uzu „konatiĝi kun iu“, kiam temas pri persono kaj „konantiĝi pri io“, kiam temas pri objekto; ekz: Mi konatiĝis kun s-o A. Mi konantiĝis detale pri tiu fako.

La esprimo „konatiĝi kun io“ signifas: fariĝi konata al io. La mallogikeco de tia rilato estas ja sufiĉe evidenta. Kvankam la jena esprimo („konatiĝi kun io“) ĝuas multjaron uzon, ĝi sendube humile cedas la lokon al la logika kaj preferinda esprimo „konantiĝi pri io“ — mi fariĝas konanta pri io.

16). Ne nur franclingvaj samideanoj, sed ankaŭ alilandanoj transplantas en Esperanton malkorektan kaj mallogikan dirmanieron, estantan malĝuste adoptita francismo, nome: „pensi al“ anst. „pensi pri“. „Pri“ signifas „teme de“ kaj estas prave abunde uzata lastatempe jen kiel prefikso (vidu Nr. 11 de „Lingva angulo“) jen kiel prepozicio, venke forigante kune kun aliaj prepozicioj la „androgenaĵon“ je, ekz., „kontenta pri io“ „diferenca pri“ ktp.

La fakto, ke la verbo „pensi“, kiu estas tipa ekzemplo por illustri la signifon de „pri“, povis esti uzata de iuj kun la prepozicio „al“, havanta tute alian destinton — pravas, kiom oni avidas strangajojn, eĉ kiam ili preterpasas la minimuman logikecon. Estas vera enigmo, ke tia „lama“ esprimo konkeris eĉ ne malbonajn stilistojn. Ke en la klasikajoj ĝi tute ne estas trovebla, estas superflue eĉ mencii.

storacioj — manĝaĵoj, en bankoj — monŝanĝon ktp. — nur en Esperanto.

Tiu metodo estas elprovita kaj sukcese aplikita de angloj, kiuj dank' al obstina energio devigis superajn instituciojn respondi angle.

„Czyń każdy w swem kółku, co każe Duch Boży, a całość sama się złoży“ — diras pola proverbo, t. e. „faru ĉiu en sia rondo, kion ordonas dia spirito, kaj la tuto mem kunmetiĝos“.

Ni kreu grandan „pel“aron, fortan armeon, kiu obstime sekvos la devizon „tuja aplikado en ĉiutaga vivo“. Ni nur „volu voli“.

Same: „paroli pri“, ne: „paroli al“.

17). „Vi havas bonan ideon? Ne gardu ĝin, sed publikigu ĝin en niaj kolonoj“ En ĉi tiu instiga frazo ripetiĝanta en unu Esperanta gazeto estas la verbo „gardi“ malĝuste uzata. La verbo „gardi“ signifas zorge konservi. La skribinto certe pensis pri la ago „kaŝi“, signifanta forigon de ies vido aŭ scio. Oni povas publikigi ian ideon kaj gardi ĝin, t. e. malforgesi ĝin, konservi ĝin en la koro kaj memoro.

18). „Kiu erarvaĝas estas la homoj, kiuj hodiaŭ tian, morgaŭ alian ideologion adoptas“ — stranga frazkonstruo, france tute bona, sed esperante terura; devas esti: erarvaĝas la homoj, kiu...

Estas ĉi tie notinde, ke la franca dirmaniero: „estas, kiu“ sonas fremde en Esperanto kaj ĝi enŝteliĝas bedaŭrinde sub la plumojn de bonaj stilistoj. Ni evitu tiun nezamenhofaĵon.

19). „deŝovigi la bastonojn de sub la akseloj“ anst. „deŝovi“.

„igi“ estas sufikso aldonata por indiki agon kaŭzitan de alia persono, ekz. vidigi — fari, ke iu vidu, anstataŭigi — fari, ke iu anstataŭu, publikigi — fari, ke io estu publika. La uzo de „igi“, kiam tia signifo ne enestas en la verbo, estas tute malkorekta. „Deŝovigi la bastonojn de sub la akseloj“ — signifas, ke iu alia kaŭzis, ke la bastonoj deŝoviĝu de sub la akseloj, sed nia teksto montras, ke la uzanto mem de la bastonoj deŝovis ilin.

P. s. S-o R. Banham el Melbourne tuŝis la uzon de „ĉirkaŭ“ rilate al „Lingva angulo“ Nr. 5. Ĉiuspecan uzon de ĉi tiu vorto mi pritraktis en „Lingva angulo“ nroj 5, 6, 12, kiuj entenas ĉiujn eblajn cirkonstancojn. Ke „ĉirkaŭ“ estas kelkfoje uzita adverbe anst. „ĉirkaŭe“, ne pravigas nin konfuzi ĉi tiujn diversspecajn vortojn. Cetere la samon komprenas la ŝatata samideano, proponante tiun dife-

rencigon por lernantoj, sed por kio elvoki la konfuzon, kiam estas necesa logiko kaj klareco? Stranga estas la konsidero, ke „ĉirkaŭ-du-horojn“ formas adverbos. Ni ne konas tiajn adverbojn.

Mirigas la fakto, ke gramatikistoj cititaj de s-o R. Banham anstataŭ simpligi la uzon de „ĉirkaŭ“ allasis evitindan, ĉar mallogikan, konfuzon.

NOVAĴOJ EL ESPERANTUJO

S. E. P. E. — Societo de publika utilo. Dank' al klopodoj de la Parlamenta Grupo por la Defendo de Esperanto — Societo Franca por Propagando de Esperanto ricevos deklaron de publika utilo. Konsiderante, ke ĝis nun la registaro ĉiam tiucelajn petojn malakceptis, oni devas ekkoni tion kiel gravan progreson.

Al Stockholma Kongreso aliĝis ĝis aprilo pli ol 1.100 samideanoj! Tiel granda nombro da aliĝintoj kelke da monatoj antaŭ la Kongreso permesas esperi, ke nia 26-a apartenos al plej brilaj kaj belaj. — Pri la plej gravaj kongresaj okazaĵoj estos farata filmo.

La gazeta demando. Laste oni multe diskutas en Esperantujo pri la gazeta demando, speciale pli kunigo de „Esperanto“ kaj „Heroldo“. Okaze de la estrarkunveno de U. E. A. dum Pasko en Genevo, la tagordo de unu kunsido enhavis ankaŭ punkton pri la gazeta demando, al kies pritrakto estis invitita ĉefredaktoro de „Heroldo“, s-ro Teo Jung. „Pro ekonomiaj kaj aliaj cirkonstancoj“ ne estis eble trovi nuntempe praktikan solvon. — Do, kiel ni vidas, la afero restas ne solvita.

Esperantista kabaredo en Tour Eifel. Radiostacio Tour Eifel dissendas ĉiusabate antaŭ la turisma prelego en Esperanto, esperantistan kabaredon, Partoprenas i. a. Raymond Schwartz.

Nica esperantistaro preparas la XXVIII-an U. E. K. en 1936 en Nico.

Novan prospekton pri Slovenio eldonis oficiale fine de marto 1934 la plej grava fremdultrafika societo en Ljubljana „Putnik“ en 4.000 ekzempleroj. — Ricevebla ĝi estas senpage ĉe „Putnik“ vojaĝoficejo — Ljubljana, Tyrŝeva c. 1 — Jugoslavio. — La Societo, vidinte la sukceson de la antaŭa prospekto, konvinkiĝis pri la praktika valoro de Esperanto por

fremdultrafiko. — Ĝi lasis ellerni nian lingvon al 1 oficistino pro la korespondado.

AL ĈIUJ ESPERANTISTOJ-JURNALISTOJ DE LA TUTA MONDO!

Ni esperantistoj-jornalistoj estas en unua serio elektataj por tio — kaj tio estas nia plej sankta devo — ke ni nian esperantistan movadon ĉiufanke subtenu!

Pro tiu kaŭzo estas necese, antaŭ ĉio ke ni unuigu nin en forta kaj tutmonda societo.

Por tio alsendu ĉiuj jurnalistoj esperantistaj al la indikita adreso siajn adresojn por pli proksima informo kaj baldaŭa komenco de antaŭlaboroj. Atentigu amikojn-jornalistojn!

Ni esperas, ke estos eble por ĉiuj membroj de nova jurnalista esperantista societo per kunlaboro en mondgazetaro tre konforman honorarion perlabori, tial preterlasu neniu tuj sian tutan adreson alsendi.

Multe da feliĉo deziras por nova societo ĝia iniciatinto!

Adreso:

Karlo Zdiarsky
Ĉes. Budějovice I., Česká 29.
Ĉeĥoslovakio.

INTERNACIAJ FERIAJ-KURSOJ EN ESPERANTO

en Silkeborg, Danlando.

Kurso por progresintoj 23/7 — 2/8 1934
Prepara kurso por Ĉe-metodaj instruistoj
23/7 — 2/8 1934.

Silkeborg (12.000 loĝ) situas en la koro de Danlando. Ĝia regiono estas la plej bela. Grandaj verdaj fag-arbaroj kaj bluaj lagoj ornamas ĝin. En tiu ĉarma urbo Dana Esp.-Instituto jam plurajn jarojn kun granda sukceso aranĝis siajn internaciajn kursojn, kiujn partoprenis samideanoj el tre multaj diversaj landoj.

Pro la tre malalta dana monkurzo en la nuna tempo estas la kursoj tre malmultekostaj por eksterlandanoj. Plena pensio (loĝo kaj manĝo) por dek tagoj kaj kurskotizo estos por ĉiu kurso nur 45, — dan. Kr. (150, — fr. fr.)

La kursoj okazos en la oficiala dana Esp.-lernejo „Kornmod“, Silkeborg. Preskaŭ ĉiuj ĉambroj estas unulitaj. La manĝaĵo estos bonega.

La kurson por progresintoj povos partopreni ĉiuj, kiuj lernis Esp.-on per elementa kurso, kaj kiuj deziras pliperfektigi kaj akiri parolekzercon. Ĝin gvidas la eminenta Ĉe-metoda instruistino F-ino M. Saxl, Berlin, kaj s-roj P. Frey kaj L. Friis. Instrufakoj: konversacio, literaturo, historio kaj gramatiko. — Instruilingvo: Esperanto. — Instrumetodoj: konversacio kaj prelegoj.

La preparan kurson por Ĉe-metodaj instruistoj povos partopreni ĉiuj, kiuj deziras instrui Esp.-on per Ĉe-metodo. La

ĉeffakon - teorion kaj praktikon de Ĉe-metodo — gvidos F-ino M. Saxl, speciale komisiita de S-ro Andreo Cseh. Por ke la kursgvidantoj estu kiel eble plej bone informitaj en sia agado, prelegos antaŭ ili pri nia originala literaturo S-ro P. Frey, pri lingvaj studoj s-ro L. Friis, pri Esp.-historio F-ino M. Noll, pri propagandmanieroj s-ro Ax. Andersen.

Belega tendejo ĉe arbaro kaj lago troviĝas tuj ekster Silkeborg por tiuj, kiuj deziras loĝi malmultekoste dum la kurstempo.

Al Universala Esp.-Kongreso en Stockholm oni povos iri rekte el Silkeborg post la kursfino per la karavano de la dana ĉefdelegito S-ro M. Palsberg.

Ĉiuj estos bonvenaj!

Petu prospekton pri la kursoj de la sekretario de Dana Esp. Instituto.

S-ro L. Friis, Frodesvej 21.
Aabyhoej, Danlando.

POLLANDA KRONIKO

Bydgoszcz. La 29. III. finiĝis la 17 Esp. kurso gvidita de s-o prof. Sygnarski. La kurson finis 20 personoj, inter ili kelkaj gravuloj.

Lwów. Societo Esperanto aranĝis solenan Zamenhofan vesperon, dum kiu faris festparoladon kortuŝe nia S-ro Prezidanto Dr. I. Fels. S-ro Zieliński parolis pri „la devoj de Esperantisto“ kaj f-ino Lola Blank deklamis la „vojon“ de Zamenhof. La 8. V. okazis grava U. E. A. kunsido, dum kiu oni elektis du novajn Delegitojn, nome s-ron Dr. Karol Klein Del. de U. E. A. kaj f-inon M. Mantel Vic Delegitino de U. E. A. La novaj Delegitoj unuanime akceptitaj. S-ro Józef Kucharz V. D. restas, kiel antaŭe. Belaj recenzoj de Viena Vespero en Lwów aperis en Chwila, Gazeta Poranna.

Sosnowiec. En 1931 dum la Krakova Univ. Esp.-Kongreso estis malfermita mondekspozicio de pentrarto en reproduktajoj. Hodiaŭ ĝi estas la rezulto de kunlaboro de pli ol 200 artistoj kaj artamantoj el 30 landoj. — Post Lublin kaj Dąbrowa Górnicza, kie la ekspozicio renkontiĝis kun aprobo, oni aranĝis ĝin de 16—22 majo en Sosnowiec. La gvidado de l' ekspozicio troviĝas en manoj de Federacio de Plastikartistoj de Dąbrowa Minejteritorio „Blok“ en Sosno-

wiec en kunlaboro de Ligo de Polaj Profesiaj Plastikartistoj en Kraków sub patronato de distriktaj lernejoj aŭtoritatoj. En sciencaj prelegoj sur fono de l' ekspozicio la lerneja junularo kaj plenkreskuloj trovas informojn pri historio de pentrarto de Pompejaj tempoj ĝis la hodiaŭaj, kiel oni devas kompreni la arton kaj ĝian rolon en la vivo kaj ekscias pri aplikado de Esp. por la internacia kunlaboro.

Warszawa. Varsovia Esperantista Societo, Leszno 56/9, telefono 1206-85. ĉiutage h. 20—22, regule laboras por la movado.

La Estraro, elektita dum la I-a ĝenerala jarkunveno, dividis la funkciojn jene: I. Dratwer — prez., red. M. Guierman — I. vicprez., red. O. Berman — II vicprez., M. Dargużański — ĝen. sekret., inĝ. M. Płoński — kas., f-ino B. Neufeld — bibl., N. Gerenreich — komisionano. Dum kelkmonata ekzistado estas gviditaj kelkaj kursoj por komentoj kaj progresintoj. La klubaj vesperoj kun referaĵoj en Esperanto okazadas ĉiumarde.

La 13-an de marto okazis sukcesplena „japana vespero“ sub la alta protekto de s-ro Nobubumi Ito, plenrajta ministro de Japanujo en Polujo. Prelegis pri Ja-

panujo s-ano I. Dratwer, dum la „vespero“ estis prezentataj japanaj kantoj (diskoj) kaj estis ekspozicio de japanajoj. La japanan standardon, diskojn ktp. pruntedonis la japana legacio. Kiel delegito de s-ro Ito ĉeestis la I-a sekretario de la legacio. La multenombre ĉeestantaj gesamideanoj akceptis aklande rezolucion, salutantan la japanan esperantistaron.

Dum la priparolita tempo okazis ankaŭ la prelego en pola lingvo de s-ro J. Jarecki pri „Esperanto“ kaj Esperantlingve prelegis s-ano J. Lejzerowicz pri „Ideaĵ komplikaj en la nuntempa Esp.-movado“. Komunikoj de la Societo ofte aperadas en kelkaj urbaj societoj.

Warszawa. Esperanta Sekcio de Pola Touring-Klubo vigle laboras. La 30. IV. finiĝis supera kurso kun tute bona rezulto kaj la 18. V. komenciĝis nova por komencantoj. Instruas f-ino Halina Weinstein laŭ Ĉe-metodo.

„Turysta i Auto“ („Turisto kaj Aŭtomobilo“) monata revuo de Pola Touring-Klubo disponiĝas en ĉiu numero lokon por esperanta movado. La aprila numero enhavas programon de la XXVI Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo kaj iom da aliaj novaĵoj; la maja numero enhavas tre belan, ornamitan per 6 fotografiaĵoj, artikolon de red. Bernhard Eriksson sub titolo: „En la lando de helaj somernoktoj“. Tradukis ĝin polen el esperanta originalo f-ino Halina Weinstein. Krome troviĝas en la numero raporto pri la Sveda Vespero, okazinta en Varsovio la 22. III. 34. kaj iom pri la XXVI.

Wilno. La 8. III. 1934 vizitis la esp. grupon ĉe ŝul-kult 5 aŭstriaĵ s-anoj, traveturantaj la mondon. Antaŭ ĉeesto de 40 homoj, inter aliaj la lernejestro kaj la lerneja instruistaro, la gastoj estis salutataj de nia ŝatata gvidanto S-ro D-ro Gurviĉ. De la gastoj respondis S-ro Petro. La s-anoj, kiuj ankaŭ ludas kaj kantas, tuj aŭdigis kelkajn Esp. kantojn. Post tio, s-ro Petro, la ĉefo, en kelkaj vortoj skizis ilian ĝisnunan vojaĝon, kio pruvigis tre interesa. Post reciproka adiaŭvorto, la tre interesa kaj memorinda por ĉiam kunveno finiĝis per la „Espero“. La supera kurso de nia grupo okupiĝas nun pri la neologisma demando, studante diversajn opiniojn de plej grandaj Esp. verkistoj kaj poetoj. Krome ni le-

gadas dum ĉiu kunveno „S-ron Tadeon“ en la Esperantlingva traduko.

En la tagoj de la 5—14-a de aprilo 1934 okazis Ekspozicio en la Juda Scienca Instituto („Ivo“), dediĉita al la plej granda juda humoristo Ŝolom-Aleĥem. En du grandaj ĉambroj plenaj de libroj, gazetoj, leteroj kaj afiŝoj en diversaj lingvoj okupas ankaŭ lokon Esperanto. Estis videblaj la „Gimnazio“ tradukita de nia Majstro, „Se mi estus Rotŝild“ kaj „Hebreaj Rakontoj“. Krome estis elmetataj Esp. lingvaj leteroj kaj du japanlingvaj libroj (ricevitaj de japana s-ano, kiu korespondadas kun la Esp. grupo ĉe Ŝul-kult) temantaj pri Ŝolom-Aleĥem. La Ekspozicio pruvis nian lingvon fleksebla pro la malfacileco ĉe la traduko de l' Ŝolom-Aleĥem-verkoj.

Zólkiew. Delegito de U. E. A., S-ro Redaktoro E. Hay, korespondanto de P. A. T. publikigis belan recenzon de la Scherer - libro en la „Gazeta Poranna“. Brazila E-grupo dankis al li pro publikigo de E.-kartoĵoj en „G. Poranna“.

GRAVE!

La subskribinto sukcesis ekinteresiĝi por Esperanto tre gravan „Unuiĝon por Turista propagando de Varsovio“, sed necesas helpo de la Tutmonda Esperantistaro. Samideanoj! postulu prospektojn esperantlingvajjn pri Varsovio, petu informon de

„Związek propagandy turystycznej m. st. Warszawy“ — „Unuiĝo por turista propagando de Varsovio“, Warszawa (Varsovio), Wierzbowa 8.

I. Dratwer, Varsovio.

LUDMILA JEVSEJEVA.

Ami, nur ami!

(Dediĉo al Judith Krievs.)

Ami, nur ami ĝis lasta enspiro,
Ami ĝis pale karmina frenez'.
Manon gracion karese mildpremi,
Eta, la vian, dum la polonez'.

Ami, nur ami ĝis lasta enspiro
Kaj ebriiĝi por ĉiam, per kis'
Vin odalisko, aŭ vin ĉarmulino,
Mia arĝenta floreto narcis'.

Ami, nur ami ĝis lasta enspiro,
Kisi, nur kisi kun arda ekstaz'
Vin, mia sankta, en Vivo-dezerto
Pompe floranta, aroma oaz'.

Riga — Majori. 2. Aŭgusto 1933 j.

SPORTO KAJ TURISMO

Gdynia, la pola haveno — kaj la transatlantika komerco.

La plej grava entrepreno de la pola ŝtato dum la unua 15-jaro de ĝia sendependa ekzistado estas sendube la konstruo de propra haveno en Gdynia. La rapideco, per kiu konstruiĝis Gdynia multfoje altiris la atenton de la ekonomiaj sferoj internaciaj, kiuj bonege kaj kun intereso sekvas la evoluon de la internacia varo-interŝanĝo. Tiom pli grava kaj atentinda estas la fakto, ke Gdynia dum kelkaj jaroj de sia komenca ekzistado superis la kapablecon de multaj baltaj havenoj, estiĝante la ĉefa haveno ĉe la Balta maro. Per tio atingis Polujo sian planon transmeti la eksterlandan varo-interŝanĝon al la mara vojo, pere de sia propra haveno. Jam en la nuna tempo akceptas la pola komerco internacia la karakteron de komerco transmara, kiu estas priservata de Gdynia en 65% de la eksporto kaj 35% de la importado. Oni povas esperi, ke la transmeto de la internacia komerco al la mara vojo elmontros pluan intensan evoluon. Gdynia jam nun posedas 33 regularajn liniojn transmarajn, kunigantaj la polan havenon kun 86 plej gravaj havenoj en la tuta mondo. La granda signifo de Gdynia estas ne nur por Polujo, sed por tuta vico da ŝtatoj najbaraj de Polujo, kaj ankaŭ por tiuj ŝtatoj, kiuj havas iajn aŭ rilatojn ekonomiajn kun tiuj ŝtatoj. La ĝisnuna varo-ŝanĝo de Ĉeĥoslovakujo, Hungarujo, Aŭstrio kaj de la Baltaj ŝtatoj en sia plej granda parto estis monopoligita de la germanaj havenoj. Ĝis la lasta tempo la sola vojo de Ĉeĥo-

slovakujo, Aŭstrio kaj Hungarujo al la norda Eŭropo kondukis tra la havenoj Hamburg, kaj Stettin. Aliflanke la tuta varo-ŝanĝo de la Skandinavaj ŝtatoj al la suda Eŭropo iris tra la germanaj havenoj baltaj, — Warnemünde, Sasnitz, Lubeka kaj Stettin. La konstruo de granda pola haveno en Gdynia forprenis la monopolan signifon de la germanaj havenoj sur la Balta maro. Gdynia jam estas provizita per la plej novaj aranĝoj grand-havenaj. Ĝi posedas nun 17 levilojn por amasa transŝarĝo, kies kapableco estas transŝarĝi 2550 tunojn en 1 horo — kaj 34 levilojn por kolektaj ŝarĝoj je 1.600 tunoj dum unu horo. Gdynia posedas grandan nombron da kovrita varo-provizejoj kaj malvarmigejoj. Konsiderinte la grandegan signifon de la haveno en Gdynia por la pola ŝtato, ni komprenos, kial la pola popolo tiom streĉis la fortojn por ties konstruo. Substrekinda estas ankaŭ la momento, ke la konstruo de la haveno en Gdynia absorbis ne nur la oficialajn, registarajn aferojn, la tuta popolo de Pollando kun plej granda atento sekvis la konstruiĝon de Gdynia, ĉar ĉiu pola ŝtatano komprenas la signifon de Gdynia, kiu fariĝis la vojo kunliganta la polan ŝtaton kun la plej grandaj kaj plej gravaj havenoj de la tuta tergloba, — Gdynia alten levas la signifon de Polujo, starigante ĝin en la vicon inter la plej gravaj ŝtatoj en Eŭropo.

Henriko Gelb, Varŝavo.

D I S T R A Ĵ O J

LA BONA EDZINO.

Smith, farmisto en la sudŝtatoj de Usono, posedas ne nur ksantipan edzinon, sed ankaŭ kore bonan filinon, kiu estas edziniĝonta al farmistido loĝanta en distanco de centoj da mejloj. La filino amas la junulon, sed same ŝi amas la patrinon. Plorante ŝi deklaras, ke ŝi neniel volas forlasi la patrinon. Jen Smith profunde ekspiras, poste time rigardas sian ksantipon kaj fine diras: „Do, mi volas rezigni, mia kara filino — prenu vian patrinon kun vi!“

(W.)

— Kio okazis, Weiss? Kial vi estas tiel malbonhumora?


— Ho, granda malfeliĉo trafis min: forlasis min la edzino!

— Ah, min trafis pli granda malfeliĉo: ankaŭ min forlasis la edzino, sed post tri monatoj ŝi revenis!

(L. R.)

Ni prezentas pluan serion de enigmoj, verkitaj de s-ro **Bruno Reichberg, Riga, Latvio**. Sendotempo por solvoj: 20 junio. La konkurso finiĝos en la plej proksima n-ro. La enigmoj valoras po 2 punktoj.


7. VOJMONTRIL-ENIGMO.



a, d, e, e, e, i, l, k, l, l, m, n, o, o, o,
o, p, ŝ, t, t, t, u, u, v, v.

La vortoj signifas: en la meza vertikala vico — fabrikon; en la horizontaj vicoj — oficiston, konjunkcion, mineralon.


8. HOMOGRAMO.



c, c, g, g, i, k, k, l, n, n, o, o, o, o,
o, o,

La unua vorto horizontale kaj vertikale signifas: birdon; la dua vorto: parencon.

9. PLENIG-ENIGMO.



a, c, e, k, k, l, l, o, o, o, o, p, p, r, r, r,
r, r, u, u, v.

Signifoj de l' vortoj: 1—2 Signo. 1—3 Birdo. 1—4 Korpoparto. 2—4 Mineralo. 3—2 Korpoparto. 3—4 Verkajo.

KARAVANO AL LA ESPERANTO-KONGRESO EN STOCKHOLM.

Ni informas ĉiujn samideanojn pri organizita ŝipekskurso al Stockholm de 3. VIII. ĝis 9. VIII. kj. sub jenaj kondiĉoj: veturado de Gdynia al Stockholm kaj reen kun plena vivteno sur ŝipo „Warszawa“ kostas aŭ 120 zł., aŭ 140, 160, 180, 200, 225, aŭ 265 zł. depende de situo de kajutoj.

La indikitaj datoj signifas tiujn de forveturo el Gdynia kaj de reveno tien.

Por eksterlandaj samideanoj estas projektata aparta ŝipo, por ke oni povu tie resti dum la tuta Kongreso.

Ni rimarkigas, ke la nombro de liberaj lokoj estas tre malgranda, tial ni petas insiste pri kiel eble plej rapida sinanonco. Malfruigo povas kaŭzi malakcepton. Detalajn informojn petu de Pollanda Esperanto-Delegitaro, Kraków, Lubicz 34. Ne forgesu aldoni poŝtmarkon por respondo.

La plej proksima prelego per radio okazos la 16 VI je la 20 h. 30 m. ĝis 20 h. 40 m. Temo: Somero en Pollando. Aŭtoro: prof. Rudolf Wacek. Ĉiuj aŭskultu, ĉar post la prelego oni anoncos pluan daton aŭ ferian paŭzon. Detaloj dume ne estas konataj.

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. rocznie zł. 6.— Zagranicą: 5 fr. szw. Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

REDAKCJO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKOW, LUBICZ 34.

ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł. 6.— Eksterlande 5 sv. fr. Aparta numero zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

KONTO P. K. O. NR. 406.660

Drukarnia L. Gronusia i Ski, Kraków, ul. Stołarska 6.

Redaktor cdpowiedzialny: Juljusz Kriss.

K U P O N O N-R O 3
P O R